

AQUILEIA



Estis fondita de Romia Militistaro – sub la gvidado de *Publio Scipione Nasica*, *Gaio Flaminio* kaj *Lucio Manlio Acidino* en la 181^a jaro a.K. – kiel arma fortreso cele al defendo kontraŭ invadoj de nordoriento kaj al konkero de norda Italio kaj de Iliria regiono, orientborde de la Adriatika maro. Ĝia nomo tamen ne estas latina, sed de kelta deveno, kiel la gento kiu tiam loĝis tie.

De militista posteno, la loko transformiĝis al unu el la plej grandaj emporioj de tiu epoko, pro sia favora geografia situo, deirpunkto de vojoj kiuj trans la Alpoj disbranĉiĝis direkte al danuba baseno kaj al “sukcena vojo” atinginta la Baltan maron, kaj krome ĝi estis grava riverhaveno, al kiu venadis la tuta merkata trafiko de la Adriatika maro.

En la tempo de Aŭgusto, *Aquileia* estis inkluzivita en la 10^a Regiono nomita *Venetia et Histria*. Sekve ĝi pliriĉiĝis kaj plibeliĝis kaj atingis, dum la 4^a jarcento, la kvaran lokon inter la italaj urboj de la romia imperio post

Roma, *Milano* kaj *Capua*. Ĝian evoluon atestas la ĉirkaŭantaj defendmuregoj, konstruitaj ĝis la 4^a jarcento. Kaj ene de tiuj muregoj, *Aquileia* kontraŭstaris la invadojn kaj sieĝojn de la Gotoj de Alariko (401 kaj 408), sed cedis antaŭ la kruela potenco de Attila, kiu kun siaj Hunoj ĝin disrabadis (452).

Oftaj rilatoj kun Oriento favoris starigon de grava centro por disvastigo de Kristanismo kaj poste de sidejo de potenca teokratia Patriarkolando, politike tre influa dum pli ol mil jaroj. La invado de Longobardoj signis la finon de la politika unueco en la regiono, kaj devigis la Patriarkon fuĝi al *Grado*, en bizanca teritorio (568). La Longobardoj elektis en *Aquileia* duan Patriarkon, kaj ekde tiam estis du patriarkoj – tio ĝis la jaro 1451 kiam la patriarkeco estis transdonita al Venecio.

Ekde la 13^a jarcento la urbo dekadencis, ĝis la konkero fare de Venecio en 1420, en kies manoj ĝi restis ĝis 1509, kiam Aŭstrio



siavice konkeris ĝin. Nur en 1751 la Patriarkolando malaperis kun starigo de Ĉefepiskopejoj en *Udine* kaj *Gorizia*. Ekde novembro 1918 ĝi apartenas al Italio.

Vizitindas surloke la prestiĝaj eltrovaĵoj, inter tiuj: la **Rivera haveno**, **Forumo**, **Termoj**, **Nacia Arkeologia Muzeo** kaj diversaj domoj, krom **Baziliko kun kripto**, kaj aliaj kristanaj konstruaĵoj enhavantaj mirindegajn mozaikojn.

La **Baziliko**, dediĉita al Virgulino kaj Sanktuloj Ermakoro kaj Fortunato, havas lokon inter la plej grandiozaj kaj gravaj



religiaj monumentoj de la romanika periodo: malgraŭ la postaj ŝanĝoj, ĝi tamen konservas la strukturojn, deziritajn de la Patriarko *Popone* en la 11^a jarcento. La solena interno estas riĉigita de la mozaika pavimo, datiĝanta de la unuaj jaroj de la 4^a jarcento, la plej impona atesto de paleokristana mozaiko en Okcidento. Tre interesaj ankaŭ la Kriptoj.

La **riviera haveno**, elfosita fine de 1800, datiĝas de la 1^a jc p.K.: oni laŭiras cipresan aleon, laŭlonge kiun videblas arkitekturaj elementoj, altaroj kaj ŝton-elfositaĵoj, havenaj magazenoj kaj la albordiĝoj por ŝipoj el diversaj grandoj.

La **Forumo**, de la 2^a jc p.K., admireblas pro la serio da kanalitaj kolonoj, pavimo kaj skulptitaj pluteoj.

La **romiaj domoj** troviĝas fronte de la aleo *Patriarca Popone*: temas pri tuta aro da loĝejoj domoj, kelkaj ankaŭ el la respublika periodo, kun restintaj mozaikaj pavimoj, kanalizaj sistemoj kaj putoj.



La **Nacia Arkeologia Muzeo** posedas unu el la plej kompletaj kolektoj de Norda Italio, fundamenta por kompreni la kompleksan realon de urbo kiu, en sia maksimuma florperiodo, havis pli ol 100 mil loĝantojn. En 9 salonoj eblas malkovri arton, kulturon, morojn, kutimojn ekde la 1^a jarcento ĝis la fino de la 4^a p.K.